

esperanto USA

The ELNA

Newsletter: News of the language problem and Esperanto as a solution

1990 (4)

Making News This Issue

From the Central Office

ELNA has finally done it! We topped our goal of 1,000 members. That means a stronger organization and a greater role in UEA. ELNA is also switching over to recycled paper in its publications. To read about these developments as ELNA enters a new era of growth, take a look at this latest report from the C.O.

See Page 5

Esperanto as she is spoke

A recent article in this newsletter about technical terms and the CEED dictionary has elicited this response from a European Esperantist, Anna Lowenstein. If the process of word development is of interest to you, don't overlook it.

See Page 6

Esperanto & the Pentagon

As the Cold War ends and new freedom and security blossoms in Europe, the military establishment is beginning to deal with peace and disarmament. Take a look at this report of a Pentagon proposal to use Esperanto for U.S./Soviet weapons verification teams.

See Page 11

In This Issue

Editorial 2

Regional Reports 4

Volas Korespondi 10

And Much, Much More to Delight and Inform You!

Familioj verdas

Esperanto en la Hejmo

de Wongill Kim

[Wongill Kim estas longtempa esperantisto kaj membro de ELNA, kiu, kun sia bela edzino Monica, decidis antaŭ multaj jaroj, ke Esperanto estu almenaŭ unu el la denaskaj lingvoj de liaj infanoj. Siajn spertojn pri uzado de Esperanto en hejma medio li mallonge priskribas en la jena artikolo. Pri denaskismo, vidu ankaŭ "Esperanto kiel lingvo heredata" de Blazio Vaha en Literatura Foiro, aprilo 1990.]


Mi loĝas en Oranĝo-Kantono, Kalifornio, kie la Esperanto-movado ankoraŭ ne vervas. Troviĝas ĉi tie dekplus-kelkaj esperantistoj, sed ne oftas kunvenoj kaj Esperanto-konversacioj raras. Mi mem estis izolita esperantisto, same kiel multaj aliaj en Usono. Mi abonis kelkajn gazetojn, korespondis kun eksterlandanoj kaj malofte partoprenis kongresojn. Tio tedis min. Mankis al mi rektaj kontaktoj kun veraj homoj. Tiam mi trovis alian rimedon kontaktigi kun fremduloj pere de

"Pasporta Servo" de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Fariĝinte gastiganto de ties reto, mi povis renkonti multajn homojn de kuriozaj moroj, malsamaj rasoj kaj religioj, interesaj profesioj kaj diversaj lingvoj de la mondo; peruano rakontis al mi pri glora kaj tragedia Inkaa Imperio, mi aŭskultis finnan fraŭlinon flustri pri la belaj betuloj kaj helaj noktoj en la nordo, mia gasto aŭstralia skizis la staton de la aborigenoj en sia insula kontinento, kaj iun nokton sendorme mi kaj pekina profesoro diskutis pri la meritoj de reciprokaj ekonomiaj sistemoj. Ĉio ĉi okazis en mia hejmo, kiun vizitis interalie japanoj, francoj, italo, germano, kanadanoj, koreoj kaj eĉ usonanoj. Nun troviĝas 904 gastigantoj en 53 landoj tra la mondo, kies hejmoj estas pretaj akcepti gastojn. Tamen mankas gastigantoj en

Continued on page 5

THERE ARE CURRENTLY 1010 MEMBERS IN ELNA

Our goal for 1990	1100
✓ ELNA membership 1989	931
✓ ELNA membership 1988	778
✓ ELNA membership 1987	572



EDITORIAL

In the Heart of Europe

Late last autumn, while searching for an editorial topic, I put down some words of prediction about what the results of the opening up of Central Europe would be. One of my predictions was that Germany would either withdraw from NATO and the European Economic Community (since the USSR would never permit a united Germany to be a part of NATO) or that the entire Community would have to loosen its NATO ties to keep Germany as a member. Well, that one seems to have crashed and burned. Germany will remain in both the EEC and NATO. Not that this will make much difference in the long run. Within a few years, if things continue as they have, Germany will be even more the economic powerhouse of Europe than it is today—a Europe including not just the current Western European states but also those of Central Europe and, perhaps, one or more of the Soviet republics—Gorbachev's "common European house." In a world where competition is economic rather than military, a NATO that includes both the United States and Europe must at best be reduced to a debating forum; at worst, it will unravel completely.

In contrast, another prediction I made appears to have come true. Based on the press reaction to Chinese English teaching a decade ago, I forecast that from 1990 to 1995 the newspapers would be full of articles with headlines reading "English Replaces Russian as *Lingua Franca* of Eastern Europe." The first such article appeared several months ago in the *Oakland Tribune*, not too long after Ambassador Shirley Temple Black's proposal to save the Czechoslovakian economy by sending 200 Peace Corps volunteers to teach English to the Czechs. The headline emphasized the coming dominance of English in Poland; the article itself talked about "western languages" in general, mentioned English only once—in the context of a single university-level program at a university in Warsaw—and suggested that Russian might well retain a preeminent position in the Polish educational system because of the available pool of Russian-lan-

guage teachers. A more recent article predicted that 30,000 English teachers would be needed in Poland by the end of this decade. Interestingly, that article appeared in the same issue of my local newspaper in which a completely unrelated article described the gradual expulsion of English from various non-Congress-Party state governments in India... but that, as they say, is another story.

To get back to my Central Europe prediction... I suggested that such stories would trail off and disappear after about 1995. This, again, is based on the Chinese experience; very seldom today do you read the sort of hype about mass English study in China that was common before 1985. But in the case of Central Europe I can be even more specific. In China the non-success of English has been due not to competition from other languages, but simply because English is irrelevant to the average Chinese; he has no motivation to sit down and go through the extremely difficult process of learning it. In Central Europe there will be, I believe, an equally strong lack of motivation, following a possible initial burst of enthusiasm. But in Central Europe there will also be strong competition. Remember what I said above about Germany being the European economic powerhouse? German has always been a sort of *de facto* regional interlanguage in that part of the world; there is no reason to suspect that, under these conditions, it will not strengthen its position.

An acquaintance of mine, a San Francisco Esperantist, recently back from a visit to Poland, told me that you can find English-language textbooks in all the bookstores there, just as in China. But you can't find any German-language textbooks. They've all been sold out.

What about Esperanto's situation in Central Europe? How will the recent changes affect its development?

This depends largely on the country. In Poland, the Esperanto movement has suffered because of a loss of government support, the combination of raging inflation and mass unemployment that have hit the country, and the fact that Esperanto is no longer a privileged channel for

international travel. Hungary is suffering from economic problems, a similar loss of governmental support, the deterioration (for esoteric financial reasons) of its main market for Esperanto books and magazines (the USSR), and, paradoxically, a plethora of new opportunities for Esperanto which are fragmenting the strengths of the organized Hungarian Esperanto movement. On the other hand, the Esperanto movement is expanding in both the Soviet Union and Romania, due to the gradual cessation of official disapproval in the first and official repression in the second. While the Bulgarian Esperanto movement seems to be taking advantage of the new openness in the country, with a market-oriented reorganization of its publishing facilities, it also seems to be in a position to profit from political continuity in a country which has freely reelected its reform-oriented Communist government. Not much news has yet come to us from Czechoslovakia, but since Esperanto was not terribly favored under the hard-line post-Dubcek government, it seems to me that the situation there can't fail to become more favorable.

In general, I would predict that during those years in which "English is replacing Russian as the *Lingua Franca* of Central Europe" the situation of Esperanto in Central Europe will not be very favorable, due not to competition from English—or even German—but to unsettled economic and political conditions that will make it difficult for the organized Esperanto movement to function properly. Still, the Esperanto movements in this area have faced and overcome far more insuperable problems in the past, and if they can maintain even a semblance of continuity through this period—and, as suggested above, some of them may do even better than merely endure—they should enter the post-reconstruction period in very good shape to help make the 21st century the Esperanto Century.

—Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

"Talk that talk" is the name of an article about Esperanto by Denyse Tannenbaum in the Middlesex, MA, *News* (Sep. 25, 1989). The article quotes Esperanto student Midge Ames and Esperantists Grace Cali and David Wolff in describing Esperanto's history and current status. (from *Verda Lumo*)

For those who have occasionally noticed ads for Movado watches and noted the coincidence of the name with the Esperanto word *movado*: the *Watch & Clock Review* (Feb. 1990), in its column "Trade News," describes *In Motion*, a new Movado Watch newsletter, and mentions that "the name...is a translation of

the word *Movado* which comes from Esperanto, a universal language invented to promote understanding among nations." (sent by Wongill Kim)

A recent issue of the *Berkshire Section News* of the IEEE (Feb. 1990) contains a reprint of a three-page article by Allan C. Boschen, Senior Member of the IEEE, on "International Communication: Getting Down to Basics." The article, originally published in 1987, gives an overview of Esperanto's history and current status, and reasons for supporting the language. Esperanto's grammar and structure are summarized in a sidebar. (provided by Cathy Schulze)

"Esperanto unites cultures, symbolizes world peace," says Saginaw, MI, *News* Staff Writer Zada A. Blayton (May 12, 1990) in an article about Esperanto and Sherry A. Wells, president of the Esperanto Society of Michigan. The article describes Esperanto and quotes Wells as saying: "Esperanto doesn't belong to anybody, yet it belongs to everybody. People speak it and their own language. It's not meant to replace other languages." (from the ELNA Central Office)

PASOJ

DALE-DALE

Okazis la geedziĝfestoj de John kaj Detalina Dale la 3an de junio en Falls Church, Virginio. Ĉeestis ges-roj Power (vidu malsupre), ges-roj Haskell, David Gaines, kaj anoj de la Bahaa Komunumo en la regiono. John Dale estas multjara ELNA-ano, kiu lastatempe partoprenis en la adhoka komitato pri la kuba afero (vidu n-ron 1989/6); pri la nova edzino ni scias nur, ke ŝi devenas de Bulgario. Ĉiuokaze, ni deziras ĉian feliĉon al la nova paro.

*Informo el La *-Bulteno*

DENEVA-POWER

La 14an de majo 1990 geedziĝis Daniela Deneva, konata bulgara sismologo, kaj Charles R. L. Power, esperantisto de la Distrikto de Kolumbio, post plurjara gefianĉeco.

La novedzino estas ankaŭ konata kiel la verkintino de matematika terminaro en Esperanto. La novedzo estis dum kelkaj jaroj Direktoro de la Centra Oficejo de ELNA, poste dum iom da tempo Konstanta Kongresa Sekretario de la Universala Esperanto-Asocio, kaj lastatempe servis dum kelkaj jaroj en la Estraro de ELNA.

Al la novaj geedzoj ni sendas korajn salutojn kaj bondezirojn.

*Informo el La *-Bulteno*

HARRIS

Erna P. Harris, multjara ELNA-ano, estis lastatempe honorita pro sia pli-ol-60-jara partoprenado en la batalo por paco kaj homaj rajtoj.

La 29an de aprilo, la Virina Internacia Ligo por Paco kaj Libereco (WILPF) okazigis lunĉon ĉe la Berklija Pacifika Religia Instruejo en Berklio, Kalifornio, por rememorigi pri la longa kaj rimarkinda (kaj ofte pridisputata) batalo de s-ano Harris por justeco kaj paco. Partoprenis 150 gastoj. Inter tiuj estas esperantistoj Stella Toogood kaj Calvin Cope, Lucy kaj Bill Harmon, George Rodenborn, kaj Sylvia Bogdan.

Oni donis al Erna kvin oficialajn memortabulojn por agnoski ŝiajn multajn jarojn da laborego. Lucy Harmon estis la unua parolanto de la tago. La memortabulo prezentita de la Berklija urbestro Loni Hancock anoncis, ke oni oficiale deklaris la 29an de aprilo 1990 kiel ERNA P. HARRIS DAY.

El Popola Berklio

KRUSE

Drew-Universitato je la 19a de majo agnoskis kaj celebris la rolon de volontuloj en la socio dum la tiutaga 122a diplomdonado de la institucio. En la ceremonio oni donis kvar honorajn Doktorecojn. Inter tiuj ricevantaj honorajn Doktorecojn estis J. Henry Kruse, Jr., urbestro de Albany, Kalifornio.

La unua blinda studento ricevinta diplomon pri artoj de Drew (1947) kaj la dua, kiu ricevis juran diplomon de Rutgers Jura Kolegio (1952), Kruse poste funkciis kiel juristo, servis la publikon kiel elektito, kaj ĉampionis la blindulojn. Kruse ankaŭ dediĉas siajn tempon kaj strebadojn por helpi aliajn en diversaj fakoj. Aktiva partoprenanto en loka politiko dum li loĝis en Nov-Jerzio, li servis dum du periodoj kiel urbkonsiliano en Albany, Kalifornio, kaj dum du periodoj kiel vicurbestro. Li nun servas en sia dua kaj fina periodo kiel la urbestro de Albany.

Aŭtodidakta lerninto de Esperanto, li laboradas por antaŭenigi la uzadon de tiu internacia lingvo, aparte inter blinduloj.

Adaptita de gazetara informilo de Drew University

VER PLOEG

Oni lastatempe informis nin, ke la 28an de decembro, 1989, forpasis Ken Ver Ploeg, longtempa kaj dumviva membro de ELNA. Dum sia multjara laborado por Esperanto, Kenĉjo kontribuis multon al ELNA kaj al Esperanto, aparte kiel komisiito de la Magnetofona Servo, kiun li traktis de la komenco ĝis kiam, pro degeneriganta saneco, li antaŭ nelonge devis rezigni pri ĝi. Bedaŭrojn pri la forpaso sentas ĉiuj en ELNA, kaj kondolencojn ni sendas al la edzino kaj geamikoj.



REGIONAL REPORT

Esperanto Activity in the United States

CALIFORNIA

Dank' al malavara donaco farita de Alberta Seabold Casey nome de la Esperanto-Klubo de San Diego, tiu klubo aperos kiel patrono de ekspozicio de la verkoj de sandieganaj artistoj apartenantaj al la "Market Street Group". La ekspozicio, kiu okazos dum ĉi tiu somero ĉe la Mona Bismarck Foundation en Parizo, inkluzivas portreton de Zamenhof kaj akvaforton nomitan "La Vintro", verkitajn de s-ino Casey. (el la Bulteno de la Esperanto-Klubo de San Diego)

La semajnfino de 11-13 majo okazis la kutima printempa Senkrokodila Semajnfino de la Berkla Esperanto-Ligo ĉe Headlands Institute norde de San Francisco. Ĉeestis entute 22 esperantistoj, inter kiuj estis vizitantoj el Nevado kaj Vaŝingtonio. La programon aranĝis Reginald Jaderstrom; surlokajn aranĝojn prizorgis Angela Harlow. Oni decidis, ke alia Semajnfino okazu ankaŭ en la aŭtuno.

La Esperanto-Rondeto de Santa Barbara nun entreprenas aranĝi la Tut-Kalifornian Esperanto-Konferencon por 1991, kiu okazigos inter la 5a kaj la 7a de aprilo ĉe la Sandman Inn en Santa Barbara. En la nuna momento mankas detaloj pri programo ktp, sed ni informos pri tio, kiam ili estos haveblaj.

DISTRICT OF COLUMBIA

La 11an de majo, 1990, la artikoloj de korporaciigo de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono estis akceptitaj de la registaro de la Distrikto de Kolumbio. Tion ĉefe ebligis Rita Guzauskis kaj Joan Gildemeister, kiuj kunlaboris por aprobigi la artikolojn. Ankaŭ kunlaboris Paul O'Sullivan kaj Martha Flores, kiuj kun s-anino Gildemeister konsentis esti la korporaciigantoj. (el *La *-Bulteno*)

NEW MEXICO

En aprilo, 15 homoj el Arizono, Kolorado kaj Nov-Meksiko kunvenis en la domo de Charlene Baker, proksime al Albuquerque, por la 5a Senkrokodila Semajnfino de la Esperanto-Grupo Intermontara. Inter la diversaj ludoj kaj diskutoj okazis projekto kunmeti numeron 36 de la EGI novaĵletero. (el la EGI novaĵletero *Raporto*)

NEW YORK

La 12an de aprilo, Thomas Eccardt, Prezidanto de la Esperanto-Societo de Novjorko, prelegis pri Esperanto ĉe la Mid-Manhattan Biblioteko. 50 personoj ĉeestis la prelegon. (el la bulteno de la Esperanto-Societo de Novjorko)

OHIO

Post la morto de s-ano Robert Wills, la Esperanto-Asocio de Centra Ohio heredis la grandan Esperantan kolekton, kiu apartenis al li kaj lia unua edzino Jane. La Asocio donacis la tutan kolekton je ilia memoro al Ohio State University. Post longa tempo, la libroj finfine estas sur la bretoj. La kolekto enhavis lernolibrojn, vortarojn, biografion de Zamenhof, tradukojn de famaj verkistoj kiel Hans Christian Andersen, Guy de Maupassant, Blasco Ibanez, kaj originalajn verkojn de popularaj Esperantaj verkistoj kiel John Francis, Zora Heide, Marjorie Boulton, Raymond Schwartz kaj Julius Balbin. (el *Ligileto*)


UTAH

La Esperanto-Grupo Intermontara anoncas, ke ĝia jarkongreso okazos 14-16 septembro 1990, ĉe la Carlson Conference Center de Westminster College en Salt Lake City. Programo inkluzivos prelegon de Charles Hall pri liaj vizitoj al Orienta Eŭropo, kie li serĉis genealogiajn

informojn helpe de Esperanto kaj esperantistoj. Derek Roff prelegos pri Esperanto en monda perspektivo, kaj pro publika repeto, li ripetos sian superrigardon de popola muziko en la Esperanta kulturo. Okazos prezento pri Lydia Zamenhof, filino de la iniciatinto de Esperanto kaj porpaca aganto. La kosto de la programo, manĝoj kaj loĝado estos ĉirkaŭ \$75. Pliajn detalojn ni publikigos, kiam ili estos haveblaj. (el la EGI novaĵletero *Raporto*)

WASHINGTON

La esperantistoj de nordokcidenta Usono kaj sudokcidenta Kanado okazigos sian kutiman NOREK-on (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco) ĉe Fort Worden State Park, Port Townsend, Washington, inter la 26a kaj la 28a de oktobro, 1990. En la Konferenco oni povos ĝui sportojn, kantadon, dancadon, prelegojn, kaj teatraĵon verkitan de Ruth Culbert (kelkfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA). Interesitoj povos ricevi aliĝilon de Les Kerr (10545 Woodhaven Lane, Bellevue WA 98004 Usono, tel. 206-455-3069).



From the Central Office

We Made It!!! 1000+ Members

For the first time, ELNA has passed the 1000 mark in its annual membership drive. This is very exciting news and we feel that it reflects the growing interest in Esperanto in the United States.

Through a combination of improved services, a more sophisticated membership drive, and hard work by everyone involved, ELNA has become a more attractive organization to belong to, and we in the Central Office are determined to do our best to increase ELNA's attractiveness. As always, your comments and suggestions are welcome; in fact, we can't do without them!


ELNA C.O. Phasing In Recycled Paper

One of ELNA's main activities is to provide information about Esperanto to the public.

The most economical and practical way to provide information to the thousands of people writing to ELNA is through flyers, the ELNA Update, etc. But those of us working in the Central Office have long been concerned about the environmental impact of our informational services. With the advent of the new fiscal year (June 1, 1990) the ELNA C.O. has started phasing in the use of recycled paper.

We started working on converting to recycled paper in January of this year. Due to the large quantities of flyers we had on hand, and a planned reformulation of our informational material, we had to wait until the beginning of the new fiscal year before we could start the actual conversion.

During the coming year we will be working to convert more and more of our printing to recycled paper. Our goal is to be using recycled paper for 50% of our printing needs by the end of fiscal year 1990/1991 and 80% by the end of 1991/1992. Flyers and publications that have been converted will bear the symbol below.



Publicity That Works

From time to time an article about Esperanto will appear in a magazine or newspaper and bring in tremendous response. ELNA member Rob Hardy of RAF Lakenheath, England, responded to an article in *The Stars and Stripes* which hailed a new language, "Canadean," as the international language of the future. In this article, the author made some misleading comments about Esperanto, to which Mr. Hardy responded in a subsequent issue.

Mr. Hardy's approach was rational, well thought out, brief and to the point. In addition, he listed

ELNA's address as a source of the free postal course.

Within weeks of the appearance of Mr. Hardy's letter, our office received more than 150 requests for further information. When the letters first came in we noticed that they were all listed as APO in New York City. This is an indication that the writer of the letter is somehow associated with the military in Europe.

We can't guarantee that letters to the editor or articles in all periodicals will get the same result, but there are a few things that help:

- Publication of ELNA's address
- Mention of the free postal course
- When a letter or article you have submitted makes it into print, drop the ELNA C.O. a line, include a copy of the material, and the date and name of the source in which it appeared.

New Correspondence Courses

ELNA recently introduced two new correspondence courses for beginners and is working on two more advanced courses scheduled for release in late 1990 or early 1991.

For more information, see the advertisement in this issue of *Esperanto U.S.A.*

—Mark Stephens
Director, C.O.

Hejmlingvo from page 1

multaj urboj en Usono, do mi volas peti niajn legantojn fariĝi membroj de la servo por helpi vojaĝantojn. Vi verŝajne ankaŭ profitos en la praktika uzo de la Internacia Lingvo, konatiĝante pri geografio, historio, folkloro kaj aliaj aferoj de viaj gastoj. Intimaj konversacioj donas al mi impulson tosti kaj spicon al mia monotona vivo kaj konfirmon de inda kunekzisto, kaj ĉe la adiaŭo ni jam estas malnovaj amikoj.

Antaŭnelonge aŭdiĝis varba kampanjo de "Esperantaj Paroj kaj Familioj", kiu klopodas trovi la uzantojn de Esperanto en ĉiutaga vivo, instigi aliajn (se vi pensas por vi mem aŭ por via infano uzi Esperanton ĉiutage, nepre kontaktu ĝin), aranĝi renkontiĝojn, eldoni cirkulaĵojn kaj porinfanajn librojn, helpi solvi lingvajn problemojn ktp. Lastjare mi kun mia familio vizitis hejmon de amikoj en Montrealo. Mia familio parolas la anglan, la korean kaj Esperanton, kaj ĉe ili la franca, la kroata kaj ankaŭ Esperanto estas uzataj ĉiutage. Ni piknikis kaj turismis en Esperanto. La gepatroj interŝanĝis ideojn kaj spertojn pri kreskigo de infanoj, trilingva edukado

kaj ĉiutagaj vortoj, dume en kuirejo poto de jugoslava pimentsupo boletis kaj ĝia alloga aromo flagris en la salono. Granda sukceso de nia restado tie estis ludado de kvar infanoj, kiuj biciklis, konstruis sablajn kastelojn, kantis kantojn kaj eĉ unu tanzilizis ĝis alia eksploris. Elokventa estis senĉesa pepado de la infanoj, ĝuste kiel internajbaraj amikoj, tiom flua kaj leĝera, ke mia antaŭa dubeto pri ilia lingva kapablo rapide malaperis. Bedaŭrinde ili ne povas ludi ofte kvarope pro la distanco, nek iri al somera tendaro en Eŭropo. Mi konstatas, ke ĉi tia renkontiĝo estas despli necesa por Esperantaj familioj izolitaj dise en Norda Ameriko kaj mi proponas al tiuj reciprokaj intervizitoj aŭ interŝanĝoj de vidbendoj aŭ almenaŭ perleteran konatiĝon. Jam en 1901 Zamenhof emfazis pri la graveco de ĉehejma uzo de Esperanto en sia letero al Kofman, ke "Lingvo internacia fortiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multe pli grava ol milionoj da aliaj ne

tiaj homoj..."

Ni ja bezonas multajn fakajn specialistojn, kompetentajn, kiuj utiligas nian lingvon en siaj profesiaj studoj kaj kontaktoj. Kaj ni ankaŭ bezonas amason da familioj, kiuj konstante uzas kaj manipulas ĝin en ĉiutaga vivo. Esperanto devas esti ne nur en klasĉambroj, ĉe kongresaj salonoj kaj en korespondaj leteroj, sed ankaŭ ĝi devus esti uzata por kalkuli tagan profiton, lulkanti por via bebo, reciti poemojn al infanoj (kaj eĉ foje skoldi ilin), por kuiri manĝaĵojn laŭ favorataj receptoj, klaĉi pri skandaletoj, esprimi plej delikatajn kaj subtilajn emociojn kaj eĉ por revii pri eventuala trafo de loterio ktp. ktp. Ĉio ĉi okazus en Esperanto. Per senĉesa forĝado, kribrado kaj polurado ĝi sekvos *naturan* vojon al maturiĝo, al rafinita *hereda* lingvo. Mia speciala konsilo al gejunuloj: provu ĝin por vi mem kaj via bebo. Granda kaj dolĉa estas rezulto.

Pasporta Servo: Pasporta Servo, Folkungagatan 126, S-116 30, Svedio
Esperantlingvaj Paroj kaj Familioj: Renato Corsetti/Anna Lowenstein, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio.

Esperanto as She Is Spoke

by Anna Löwenstein

[Anna Löwenstein, who as Anna Brennan edited the magazine *Sekso kaj egaleco* for several years, now collaborates with Renato Corsetti to prepare and publish the magazine *Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj* (see Wongill Kim's article elsewhere in this issue). Inasmuch as she is very interested in the use of Esperanto daily life, she has reacted to Doug Portmann's articles about Peter Benson's CEED.]

I was irritated by Doug Portmann's article on the *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* (*ELNA Newsletter*, 1989/7). His approach seems to me to be typical of someone who does not use Esperanto in practice but regards it as a sort of interesting mental exercise.


He talks about the need for a lexicographer to select one, or a few, terms in Esperanto to translate a single word in English. He seems to be assuming that out of a number of existing terms, only one or two are going to be correct, while the others should be rejected. In fact, one of the joys of Esperanto is that there are so many ways of translating a single word, and *all* of them are correct, although of course some may be more appropriate than others in any given context. A good Esperanto speaker should be able to select—or invent—the most suitable term depending on the situation, and which aspects she or he wants to emphasise of the concept in question.

Doug Portmann criticizes the use in CEED of the word "kunliniigi" to translate "align", saying that it is unsupported by other sources. Again, we come up against the idea of a particular term being "right" or "wrong". The fact that no lexicographer apparently thought of it before Pete Benson (the compiler of CEED) proves nothing except that he applied a bit of original thought. I would say it was quite a good translation of the word "align", and I also liked "kunliniigi".

Doug Portmann prefers "alliniigi" on the basis of the fact that it is cognate with the French and Spanish terms. He is not looking at the internal meaning of the Esperanto word, but basing his choice on external—non-Esperanto—criteria. It is true that it may help to compare terms in several languages, because this shows

what aspects of the concept are important to speakers of different languages. But the existence of a particular compound in French or Spanish does not in itself justify its adoption in Esperanto.

In trying to translate a word like "align", you should ask yourself, "What am I trying to say?" Imagine yourself explaining to a friend in Esperanto how to align two objects, and see what you come up with. If you find yourself stumbling up against the word "align", that shows that



you're thinking in English, not in Esperanto. You will probably come up with a three- or four-word phrase, but don't worry; don't forget that different languages may not always have a precise one-to-one equivalent for every concept. The resulting expression won't look so good in a dictionary, but languages exist to be used, not for pinning down in neat word lists.

As for the word "bleach", I didn't need a dictionary to come up with the word "blankigilo", and I presume that 90% of Esperantists would know what I was talking about, particularly since speech usually takes place in an appropriate context. I would also accept "paliga likvo" and "blankiga likvo". I'm not so sure about "senkolorigilo". All the words I know of in European languages seem to revolve around the concept of whiteness. This is a case where it would be useful to know what the word is in Chinese, for instance. (Why only in German, English, French, Italian, Russian and Spanish?) "Klorkalko" would be OK in a technical context, just as it is sometimes appropri-

ate to say "sodium chloride" instead of "salt". But try out Doug Portmann's suggestions "blankigenzo" and "blanĉo" on a couple of Hungarian Esperantists and see what kind of reaction you get—and they wouldn't even be able to look the terms up in a dictionary.


On the subject of the new suffix *-enz*, Doug Portmann assures us that it is favoured by Esperanto chemists as more precise than *-il*. I suggest that they stick to their chemistry. I accept the fact that science requires its own terminology, but here we are talking about normal words used by ordinary speakers.

By the way, although I've been pretty active in the Esperanto movement for about the last twelve years (under the name Anna Brennan), I've never come across that suffix before. Nor has anyone ever said to me, "You know, Anna, I've often felt the need of a suffix in which the instrument has to be a substance, as opposed to a tool, performing the action of the root." It strikes me that just fluent Esperanto speakers are getting along just fine with *-il*. I notice that it's not usually the real speakers of the language who start inventing new affixes or prepositions.

Next we come to the extraordinary term "vatro", proposed by *Esperanta Bildvortaro* for a car radiator. As someone who speaks Esperanto regularly (I use it at home with my Italian husband), I have always referred to that particular object as "radiatoro", and although I've never looked it up before I now see that this use is supported by PIV. I bet that's what most of you call it as well, and to hell with the *Bildvortaro*.

If I had to talk about coolant, I would probably say something like "malvarmiga likvaĵo por la aŭtomobila radiatoro", which is lengthy, but quite clear. In context it would be instantly shortened to "malvarmigilo". Doug Portmann argues that coolant does not really cool the radiator but merely carries away heat. He is making the common mistake of forgetting that Esperanto is a language, and as such reflects human thought processes, which may not necessarily be totally precise. The function is

Continued on next page



LETTERS

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc.]

Bonvolu akcepti miajn plej elkorajn bondezirojn kaj pardonu min ke mi skribas rekte al vi. Dum la pasintaj kelkaj minutoj mi tralegis la ekzempleron de *ELNA Newsletter* kaj kun granda intereso viajn verkaĵojn "If it ain't broke..." kaj "Masters of Tongue Fu." Mi volas gratuli vin pri tiuj raciecaj kaj bonhumoraj artikoloj.

Mi mem lernis Esperanton dum la jaroj 1950-aj, kiam viglis ekz. Alan Connor (kiun mi konis). Dum eble 20 jaroj mi ne partoprenis en iu movada agado ĝis antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi komencis uzi kaj (iomete) varbi pri Esperanto denove. Intertempe mi trovas kelkajn novaĵojn, ekz. la strangan uzon de "-io" anstataŭ "-ujo" en landnomoj. Mi trovas min akorda je la Aziaj Esperantistoj kiuj malŝatas tiajn novajn manierojn. Nature, novaj ideoj kompreneble okazas, kaj eble kelkajn oni akceptus en Esperanto. Sed, kial do, mi dum la jaroj ofte miras kaj demandas min, oni daŭre uzas la supersignatajn literojn kaj ne anstataŭas la forlasitajn "x," "q," ktp por rezultigi literumadon nesuperisgnatan? Mi unufoje ekrigardis finnan proponon pri tia ideo, kaj neniam poste renkontas la ideon. (Mi mem ĝoje literumas tiel, kiel oni ĝenerale literumas, kaj havas nenian seriozan problemon pri tio.)

Via punkto pri la valoro de Esperanto ja trafas: ĝi estas pli klopodo plifaciligi interkomprenon ol ludila konstruaĵo. Bonege!

John F. Schilke, M.D.

[La uzadon de la pli-malpli neŭtrala landnoma sufikso -IO proponis anoj de SAT antaŭ multaj jardekoj; ĝia lastatempa pliĝeneraliĝo estas ekzemplo pli de socia ol de lingva evoluo (kiel Ionel Onet klarigis al mi, Rumanio anstataŭ Rumanujo ebligas distingi inter rumanoj—difinita gento—kaj rumanioj, kiuj povas esti rumanoj, hungaroj, ciganoj, ŝvaboj, ktp. Ortografiaj reformproponoj—preskaŭ neniam konsekvencaj inter si—daŭre aperadas, sed jam antaŭ preskaŭ dek jaroj la Akademio rifuzis plu malŝparisian tempon pri ili, akceptante la jam ekzistantan racian ortografion de Esperanto.]

Mi skribas al vi por prezenti sugeston. Mi legis kelkajn fremdajn Esperantajn novaĵleterojn aŭ ĵurnalojn eldonatajn de naciaj asocioj kaj mi rimarkis, ke multaj el ĉi tiuj eldonaĵoj uzas reklamojn. Kompreneble la reklamoj kutime traktas Esperantajn aferojn. Mi opinias, ke la uzo de reklamado kontribuus la necesan monon por eldoni la novaĵleteron aŭ por aliaj uzoj. Mi estas certa, ke ELNA uzus reklamadajn enspezojn.

Ĉar la novaĵletero estas distribuata al ELNA-anoj tra la tuta lando, kompanioj kun naciaj produktoj volonte elspezus monon por reklamado. Eĉ malgrandaj

komercoj aŭ komercistoj situantaj en regionoj kie ekzistas grandaj segmentoj de esperantistoj (ekzemple la "San Francisco Bay Area") uzus reklamadon. Mi scias, ke komercistoj uzas reklamadon. Antaŭ jaroj mi estis ligita kun la produktado de hejmasocia novaĵletero kaj ni havis sukceson kun hejmurabaj komercistoj kiam ni petis ilin meti reklamojn en nia ĵurnaleto.

Walter Cardwell

[Kelkaj sugestis al mi, ke pri reklamoj, same kiel pri simplaj abonoj al EUSA, eventuale ekzistas ia imposta problemo. Mi volonte petos, ke la Estraro de ELNA kontrolu pri tiu problemo, kaj faru ian gvidlinion pri la akceptado de reklamoj, ĉar mi mem estus tute preta aperiĝi ilin en EUSA.]

[Prof. Sid Culbert, ano de ELNA, ankaŭ estas la respondeculo pri la tabelo de ofte parolataj lingvoj en la ĉiujara *World Almanac and Book of Facts*.]

Se ĉiu parolanto de Esperanto varbus nur unu novan parolanton ĉiun jaron, ĉiu homo en la mondo parolus Esperanton en la jaro 2001—do kiam vi ankoraŭ estos juna, kara leganto. Ĉu vi jam varbis iun en 1990?

En la mondo estas 6160 lingvoj. Esperanto nun havas pli da parolantoj ol 6000 el tiuj lingvoj. Do, laŭ la nombro de parolantoj, Esperanto estas en la plej altaj tri procentoj el ĉiuj parolataj lingvoj.

Sidney S. Culbert

Is Spoke from previous page


not to create scientifically correct definitions. What is important is that new words should be understood.

I hadn't actually intended to discuss every word in the article, but now I've got this far, I'd like to throw in a comment about "contaminate". I admit it's a hard word to translate, and at first I was stumped. But then I realised that I've been using the Esperanto equivalent all along, and as usual, in context it didn't cost me a moment's thought. It so happens that we have a contaminated water supply, or, as we always explain: "Nia akvo estas poluciita". It's quite clear that

that means, but what would you understand if I said the water was "distoksita"? We also talk about "fiemia polucio" and "bakteria polucio". In case you're wondering whether "contamination" and "pollution" mean the same thing, well, they do. I've just checked it up in my English dictionary, which even uses one to define the other.

May I suggest to readers that the best way to come up with new terms in Esperanto is to talk the language as much as possible. You need to get to a stage where you're thinking in Esperanto, instead of translating ready-made concepts out of

English. And if the result seems too simple, well, that's what good Esperanto is like: simple, clear, easy to understand.



Anoncoj

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondeci definitivan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

Loka Esperanto-Klubo organizas bildkart-ekspozicion kun la temo: **URBODOMOJ DE LA MONDO**. Ni reciprokas per bk. pri nia urbo. Sendu taŭgajn bildkartojn al: **Esperanto-Klubo, 3400 CLUJ-NAPOCA, C. P. 1111, Rumanio**.

La Nacia Esperanto-Centro en Madagaskaro nun provas provizi al si diversajn televidilojn por instruaj celoj. Ii ankaŭ povos uzi televidilon de normo NTSC, kiu estas kutima en Usono, kun magnetoskopo. Ii ankaŭ akceptas aliajn ilojn utilajn por instruado, ekz. magnetofonojn aŭ neuzitajn kasedojn. Kontaktu la jenan adreson: **Centre National d'Enseignement de La Langue Internationale Esperanto, Boite Postale 3171, ANTANANARIVO-101, Madagaskaro**.

La Ĝenerala direkcio de la Ĉeĥoslovakaj Ŝtataj Fervojoj kun Sciencoteknika komitato por Trafiko, sekcio de Fervojo kaj Fervojista sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio aranĝos internacian konferencon "Fervojo Sojle al 3-a Jarmilo" en Brno, Ĉeĥoslovakio, la 9an ĝis 10a de majo 1991 sub aŭspicio de la ĝenerala direktoro de la ĈSF Ivo Malina. Tuj poste sekvos la 43-a Kongreso de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj, la 11an ĝis 18a de majo, ankaŭ sub la aŭspicio de Ĝenerala Direktoro Malina. Por informoj: **D-ro Petr Chrdle, VUZ-Fervoja Esplorinstituto, U. Luzického seminare 3, CS-11857 PRAHA 1, Ĉeĥoslovakio**.

La Esperanto-societo "Liberiga Stelo" en Osijek, Jugoslavio, volas evolui kiel kultura centro de la regiono Slavonio. Por tio ĝi bezonas financon subtenon de Esperantaj societoj, ligoj kaj unuopuloj. Interesitoj turnu sin al: **Esperanto-Societo "Liberiga Stelo", poŝtkesto 27, YU-54001 OSIJEK, Jugoslavio**.

Lige kun la disflorado de Esperanto en Togolando kaj la unua afrika kongreso de Esperanto, kiu okazos fine de la nuna jaro, la juna asocio en Togolanda planas aranĝi

prelegojn tra la lando. Oni volas montri ankaŭ bildojn pri la tutmonda movado. Oni do petas sendon de diapozitivaj aŭ de aliaj Esperantaj por helpi en la informado. Se vi povas helpi, bonvolu sendi al: **GBEGLO Koffi, B. P. 13169 Nyekonakpoe, LOME, Togo**.

Por kolekto de muzik-terminoj en Esperanto, oni petas la proponon de inkluzivotaj terminoj en la formo de citaĵoj, kiuj nepre montru la uzmanieron, aŭ per difino en Esperanto (ne en nacia lingvo) aŭ per uzo en frazo. Muzikaj citaĵoj ankaŭ bonvenas. Proponojn oni sendu al **Andreo Marshall, 42 High St., Waltham, GRIMSBY, S. Humb., DN37 0PL, Anglujo**.

Tempo: la 14-27-a de aŭgusto 1990. Loko: Sporta bazejo de Ivanova Universitato sur la bordo de Rubskoe-lago, plej bela kaj pura lago en Centra Rusio. Okazaĵo: **OKSEJT-31, 100-jara datreveno de la komenco de Esperanto-agado en Ivanovo**. Kosto: 55 rub. partoprenkotizo + 15 rub. aliĝkotizo. La kvanto de partoprenantoj estas limigita—ne pli ol 150 personoj! Por informoj, aliĝiloj ktp: **Esperanto-Klubo, SU-153002 IVANOVO, a/j 732, Sovetio**.

Se vi intencas viziti Vjetnamion, afable helpos fervora esperantisto, emerito, por renkontoj en Esperanto-klubo, ekskursoj, promenoj aŭ aliaj celoj kiel loka akompananto. Por pliaj informoj rilate turismon, komercon aŭ investon, bv aldoni 2 Internaciajn Respondukuponojn. Adreso: **s-ro Nguyen do Khanh, Chu hniem ESPERANTO STK 19/3 Bui Huu Nghia Q.5, HO CHI MINH (Saigon), Vjetnamio**.

Feri-Entreprene "FWP" kaj la Vroclava Filio de la Pola Esperanto-Asocio proponas plurajn dusemajnajn feriskipojn en aŭgusto kaj septembro en la pitoreska ripozloko Miedzygorze en la Sudetymontaro, 130 km sude de la regiona urbo Wroclaw Enloĝigo kaj programo en 14 apude situantaj alpstilaj ripozdomoj de la Ferientreprene "FWP". Arbokovritaj montoj kaj kvietaj, virge idiliaj valoj, kiujn trapasas kristalaj torentoj, riĉa reto da vagvojetoj kaŭzas, ke Miedzygorze estas vera paradizo por pasiaj vagantoj. Ankaŭ bonvenaj estas lernantoj kaj komencantoj. Por pli precizaj informoj pri datoj ktp: **Pola Esperanto-**

Asocio, Vojevodja Filio en Vroclavo, PL 50-952 WROCLAW 17, ul. Dubois 3, P.O. Kesto 16, Pollando.

En Silezio agas pli ol 20 Esperanto-grupoj kun kelkaj miloj da membroj. La Vroclava Esperanto-Klubo organizis Silezian Esperantistan Gastservon kaj regule eldonas adresliston de sileziaj esperantistoj, kiuj kontraŭ modesta pago (\$3-\$5 nokte, enkl. matenmanĝon) disponigas siajn loĝejojn al eksterlandaj esperantistoj. Por listo de reguloj kaj aktuala adreslisto: **Vroclava Esperanto-Klubo, P.O. Kesto 16, PL 50-952 WROCLAW 17, str. Dubois 3**.

Por tiuj, kiuj interesiĝas pri geneologio (prapatologio) kaj/aŭ heraldiko (blazonologio), oni nun projektas fondi Esperantistan Geneologian kaj Heraldikan Federacion, kies celo estas informi esperantistojn pri geneologio kaj genealogojn pri uzebleco de la internacia lingvo por genealogaj esploroj. Oni planas eldonadi en Esperanto geneologian bultenon, organizi geneologiajn seminariojn kaj eldonadi geneologian fakliteraturon en Esperanto. Usona kontakto por informoj pri la nova Federacio: **S-ro Charles M. Hall, P.O. Box 21346, Salt Lake City, UT 84121, Usono**.

Jugslavia Stelo—movada, kultura, literatura gazeto tute en Esperanto aperas kvar fojojn dum la jaro sur 12 grandformataj (13 x 9 koloroj) paĝoj. El la enhavo: diversspecaj materialoj (originalaj kaj tradukitaj), fotografiaj, gravuraĵoj, reklamoj, ktp. Abonkosto por Usono kaj Kanado: 12 usonaj dolaroj. Peranto: **Ionel Onet, 822 W. A St. ap. 111, Hayward CA 94541, Usono**.

9-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto (ARKONES) okazos en Poznan, Pollando, la 19an ĝis la 21a de oktobro 1990. ARKONES estas renkonto de organizantoj kaj kreantoj de Esperanto-kulturo. Okazos seminario, scenejaj prezentaĵoj kaj spektakloj, ekspozicioj, prezentado kaj promocio de esperantlingvaj artistoj, aktoroj, kantistoj, verkistoj, teatroj, kabaredoj, ĥoroj, ensembloj kaj filmoj. Por informoj: **Elzbieta Malik, ul. Podmiejska 15, PL-61-357 POZNAŬ, Pollando**.

RECENZE

Gbeglo, Koffi: *Mi vizitis grandan urbon*. Goiania: Zamenhof Editores, 1989. 43 p. Ĉe ELNA: Kodo MIV001, Prezo \$4.95 (nemembroj)/\$4.70 (membroj)

Ne ofte okazas, ke pluraj personoj pridiskutas saman libron (cetere malgrandan) en unu sola recenzo. Pli ofte, grupo de legintoj (antoj) priparolas saman libron kaj, ĝenerale, ĉio finiĝas post la diskutoj, eventuale disputoj. Post diskutoj—sufiĉe flamaj—la grupo de studentoj ĉe la progresiga E-kurso okazinta jam du sinsekvajn semestrojn ĉe la Berkliia Universitato, surpaperigas siajn opiniojn, kiuj volas esti kvazaŭ grupa recenzo. Jen la rezulto (io):

“Mi ĵus vizitis grandan urbon”, laŭvoĉis Gaĝenu ĉe la publika placo de sia vilaĝo. Tiu deklaro estas farita preskaŭ je la fino de ĉarma kaj informa novelo. Sendube, la vilaĝanoj aŭdos tre ofte pri la travivaĵoj de Gaĝenu en la granda urbo, sed por ni—legantoj—estas pli oportune lerni pri vilaĝo, kiu estas por ni same neordinara, kiel la granda urbo por Gaĝenu. (Bob)

Tiu ĉi longa rakonto, kiu priskribas la spertojn de naiva, sed iom ruza vilaĝano vizitanta la ĉefurbon de Togolando—Lomé—estas ĉarma kaj samtempe valora historieto. Valora, ĉar ĝi malkaŝas interesajn detalojn pri la vivo en afrika vilaĝo, en maniero simpla kaj natura, kvazaŭ la aŭtoro opinius ke ĉiu legonto bone konus la vilaĝajn medion kaj pensmanieron, kaj sekve profunda klarigo—pro falsaj honto aŭ fiero—ne necesas. Ĉu eŭropano povus prezenti Afrikon (almenaŭ malgrandan parton) tiel honeste? (Robert)

La verkisto informas nin pri la vivo en malgranda togolanda vilaĝo ne per formalaj instruado, sed permesante al ni rigardetojn al la vilaĝa socio. (Bob)

Mi vizitis grandan urbon estas libro, kiu pritraktas la vojaĝon kaj okazaĵojn ĉirkaŭ tiu, de vilaĝa fiŝkaptisto al urbejo. Ne mankas al nia ĉefrolulo la personeco, kaj tia neofta sperto (viziti urbon) donas al li la okazon aspekti grava kaj respektinda. Kaj tio okazas ne nur en la vilaĝo mem, sed ankaŭ survoje al/el urbo. Ekde la momento, kiam la vizito iĝas iminenta, Gaĝenu klopodas gravuliĝi, kaj tio daŭras semajnojn. (Dan)

La simpla, malfermita personeco de Gaĝenu kelkfoje allogas, kelkfoje forpuŝas. Siajn emociojn, ĉu ĝojajn, ĉu ne, li esprimas tuj, sen ia peno modifi aŭ ĝentiligi ilin. Tia konduto infaneca povus konduki al la impreso ke Gaĝenu estas mallerta, simpla vilaĝano, sed la vero estas alia. Li posedas sufiĉan kapablon travivi sian viziton kaj eĉ gajni el tio. (Robert)

Rilate la lingvaĵon de la libro, ĝi estas bona kaj la simpleco de la stilo iel respegulas la pensmanieron vilaĝan. Mankas en la verko kaj neutilaj neologismoj kaj komplikegaj frazstrukturoj. Aŭtomobilo, ekzemple, estas “veturilo”. Kiel ĝi aspektas eĉ ne gravas. (Bob)

Gbeglo Koffi skribis sufiĉe por kapti la atenton, sed mi ŝatus havi pli da detaloj pri Gaĝenu vizitinta la grandan urbon. Verku pli, s-ro Gbeglo, sed iom pli detale. (Cynthia)

Kvankam fragmentita, la supra recenzo povas doni kelkajn informojn por tiuj, kiuj ŝatus legi originalan libron verkitan en Afriko, publikigitan en la Suda Ameriko, kaj studatan en la Norda Ameriko, en lingvo, kiu apartenas nek al la aŭtoro nek al la publikiginto nek al la studentoj, sed al ĉiuj same—Esperanto. (io)

—Ionel Onet

Hŭa Gjiĉing k.a.: *Bovisto kaj Teksistino*. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 54 p. Ĉe ELNA: Kodo BOV001, Prezo \$1.75 (nemembroj)/\$1.65 (membroj)

Historie, la fabeloj same grave rolas en la Esperanta literaturo kiel en aliaj. Unu el la solaj restantaj fragmentoj de la ur-Esperanto de 1881 estas parta traduko de “La Ombro” de Hans Christian Andersen, kies plena verkaro poste aperis de sub la plumo de Zamenhof (ĉu oni lastatempe reprints reeldoni la tuton, de post la abortita provo ĉe *Heroldo* antaŭ preskaŭ tridek jaroj?), kaj antaŭ eble naŭ jaroj Iltis reeldonis la Kabetradukon de kelkaj fabeloj de la Fratoj Grimm. Sed pri lastatempa eldonado ĉefe respondecas la ĉinoj, kiuj estas ankaŭ konataj pro siaj belaj kaj malmultekostaj infanlibroj en Esperanto. Ĉi tiu volumeto

estas, se mi ne eraras, la sesa en serio, kiu komenciĝis per *Rakontoj de Afanti*. Same kiel la ceteraj en la serio, ĝi estas valora kiel didaktika legolibro por postkomencantoj, pro la relative simpla lingvaĵo kaj pro la mallongeco de la enhavaĵoj; sed la noveloj ankaŭ estas interesaj en si mem.

El la kvar fabeloj, la plej frua, “Meng Ĝjangnu”, estas la historio de virino, kies novelo estis sklavigita por laboregi ĉe la Granda Muro en la fora nordo; kaj la plej lasta, “La blanka serpento”, traktas du fratinojn-serpentojn, kiuj homiĝas kaj, kune kun la edzo de unu el ili, simpla apoteko, devas lukti kontraŭ malbonintenca bonzo; tiel nova estas tiu fabelo, ke la nun registrita klimakso ne estis kreita ĝis 1929.

Por mi, pli interesaj estas la du centraj fabeloj. Mi ofte vidis en la Esperantlingva ĉina literaturo menciojn pri la Bovisto (stelo Altairo), la Teksistino (stelo Vego), kaj la Arĝenta Rivero (ni nomas ĝin la Lakta Vojo), kiu disigas ilin; sed nur el la titolfabelo mi fine ekkomprenis la devenon de tiuj nomoj. Temas pri bovisto kiu enamiĝas kun feino; la fina disiganto estas (ĉu povus esti aliel?) la senkompata bopatrino, kiu per sia harpinglo elskrapis la Arĝentan Riveron.

Pli persone trafa estas “Ljang Sanbo kaj Gu Jingtaj”. Tiun fabelon mi antaŭ kelkaj jaroj la unuan fojon aŭdis (ne legis) de amikino, kiu donacis al mi sonbendon “La Papiliaj Geamantoj”, kies enhavatan simfonion inspiris ĝuste tiu fabelo. Temas pri junulino Gu Jingtaj, kiu por fariĝi klera devas maski sin kiel knabon, sed poste enamiĝas kun lernejkolego, kiu ne scias pri ŝia ineco. Prokrastoj kaj nekomprenejoj, kaj feŭdismaj kutimoj, kondukas al neevitebla tragedio.

Interesa kaj informa estas la postparolo de Hŭa Gjiĉing, la kompilinto; mi nur malkonsentus (el Okcidentana vidpunkto) kun lia konkludo, ke “la herooj kaj heroinoj en la kvar popolaj rakontoj havas ĝojigan aŭ iagrade tolereblan finon”. Neniu el ili postvivas, laŭ la okcidenta formulo, “feliĉe kaj por ĉiam”. La tradukoj de Censinio kaj Akademiano Seimin estas nekritikeblaj.

Forte rekomendata.

—Don Harlow

**Learn Esperanto in the convenience
of your own home through ELNA's self-paced Home Study Program!**

Each level of the Home Study Program is self-contained, all you need is a tape recorder and your spare time. In addition, your course will be guided by a qualified instructor of Esperanto, giving you the personal attention you need.

The just released Level One and Level Two of the program are designed to emphasize building conversational skills with a focus on everyday expressions.

Why wait? Start now on the road to truly person-to-person communication through the international language Esperanto by enrolling today!

LEVEL ONE — Using the textbook and cassette tape for the popular Jen Nia Mondo 1 radio course, this 12 lesson course will quickly guide you to mastery of basic Esperanto. **COURSE MATERIALS:** Jen Nia Mondo 1 book (66 pages), Jen Nia Mondo 1 audio cassette, and workbook. Course Number 101..... \$35.00*

LEVEL TWO — As a continuation of Level One, this 13 lesson course focuses on a more detailed analysis of Esperanto as a language in it's own right. This course is recommended to the serious student as a follow up to 101 above. **COURSE MATERIALS:** Jen Nia Mondo 2 book (89 pages), Jen Nia Mondo 2 audio cassette, and workbook. Course Number 201 \$40.00**

Note: LEVELS THREE and FOUR are scheduled for release in late 1990 or early 1991 and will be announced when available.

ELNA CORRESPONDENCE COURSE REGISTRATION FORM

return this form with check or money order to: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530-1129

Name: _____ Date: _____

Address: _____

City/State/Zip-Code: _____

Telephone #: _____

Please enroll me in the correspondence course indicated below. I am enclosing \$_____ check or money order made payable to ELNA.

101-LEVEL ONE..... \$35.00*

102-LEVEL TWO.....\$40.00**

* & ** : If you already have the book and tape set for Jen Nia Mondo 1 or 2, you may subtract \$12.00 from the price of the appropriate course level.



President: Ken Thomson (1990)
Vice Pres.: Dr. Duncan Charters (1990)
Secretary: Virginia Stewart (1992)
Treasurer: John B. Massey (1991)
Other Board Members: Prof. James Fonseca (1990), William R. Harmon (1990), David Wolff (1990), Ellen Eddy (1991), Nels M. Nelson (1991), William H. Schulze (1991), Prenda Cook (1992), Frank Helmuth (1992), Dr. Jonathan Pool (1992)
Commissioners: William R. Harmon (CO), D. Holland-Kaup (Correspondence Courses), J. Gildemeister (Legislative Affairs), R. Kent Jones (Science & Technology), Jim Deer (Tape Service), Lucy Harmon (Travel Affairs), J. B. Massey (Wills and Gifting), Ellie Stein (Women's Affairs), Dr. James Cool (Youth Affairs), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs)
Director, ELNA CO: Mark Stephens
Asst. to the Director: Ionel Onet
ELNA Archivist: Hal Dreyer

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1990

Friend of Esperanto	\$7.50
Regular	\$25.00
Family	\$37.50
Youth (under 26)	\$12.50
65 year or above	\$15.00
Sustaining	\$50.00
Life	\$500.00

Dues are for the calendar year and are tax-deductible.

UEA dues 1990

Member-Guidebook only (MG)	\$ 7.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$16.00
Member-Subscriber (MA)	\$39.00
Societo Zamenhof (additional)	\$78.00
Subscription only to Esperanto	\$23.00
Subscription only to Kontakto	\$12.00
Life Membership in UEA	\$975.00

Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA/UEA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (415) 653-0998. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1990(7) of Esperanto U.S.A./The ELNA Newsletter is November 25, 1990!

**ELNA Newsletter
 Volume 26, No. 4
 ISSN 0030-5065
 Esperanto League for North America, Inc.
 P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
 Telephone: (415) 653-0998
 Editor: Don Harlow**